

TEJO KAJ DEMOKRATIO

Kiel TEJO entute rilatas al demokratio kaj al rompo de demokratiaj valoroj en diversaj landoj?

Entute TEJO ne dependas de iu ajn politika partio kaj estas neŭtrala pri aferoj, kiuj ne rilatas al ĝiaj celoj.

Tamen, unu el niaj celoj estas subteno de konstruado de socio inkluziva kaj rajtrespekta. Sendube, TEJO subtenas la ideojn de demokratio. Temas ne nur pri socia ordo de diversaj ŝtatoj, sed ankaŭ pri ĝia interna ordo, ĉar TEJO mem estas demokratie gvidata, kio ankaŭ estas grava postulo por ĝiaj landaj kaj fakaj sekcioj.

Rompo de ĉi tiaj valoroj malhelpas atingon de niaj antaŭe menciitaj celoj. Krome, nedemokratia medio ofte naskas valorojn, kiuj rekte kontraŭas niajn idealojn kaj strebojn. Ofte naskiĝas en tiuj medioj fermiteco, politikaj izoliĝo (kaj izoligo) de ĉiuj nacioj de la mondo kaj rompo de reciproka fido inter diversaj popoloj. Inluas ĉi tion amaskomunikiloj, al kiuj mankas plurflanka kontrolo kaj konsidero de diversaj vidpunktoj.

Ĉu TEJO evitas rilati al organizoj devenantaj de "nedemokratiaj landoj"?

Laŭ sia statuto TEJO celas "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo".

¹ La politika organizado de ajna lando ne influas nian emon agadi en tiu lando. Kompreneble, homoj loĝantaj en nedemokratiaj landoj ne nepre estas subtenantoj de sia registaro. Ankaŭ ĉi tiuj homoj povas esti utilaj por ni kaj ni povas esti utilaj por ili. Pro tio certe TEJO ne emas eviti kontaktojn kun organizoj el nedemokratiaj landoj, se tiuj organizoj kongruas kun nia idearo.

Cetere ankaŭ laŭstatute TEJO celas "helpi la junularon havi aktivan rolon en konstruo de socio inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta".² Ofte nedemokratiaj socioj ne povas garantii respekton de rajtoj. Por TEJO tio signifas, ke nedemokratiaj landoj estas lokoj, kie la valoroj de TEJO estas bezonataj kaj kie ĝi havas spacon por laboro.

TEJO havas multajn landajn sekciojn, inkluzive tiujn, kiuj devenas el landoj, kiuj estas vaste internacie agnoskataj kiel nedemokratiaj. Sed ankaŭ tie estas multaj talentaj homoj, kiuj aprezas la valorojn de TEJO kaj kiuj volas esti parto de io pli granda kaj internacia, strebantaj plibonigi la vivon de la homaro. Sekve, politika ordo de iliaj devenlandoj estas certe malprioritata afero por ni, kiam TEJO faras decidon pri kontaktoj kun lokaj organizoj.

Ĉu TEJO strebas subteni demokratiigon de alilandaj socioj?

TEJO mem ne okupiĝas rekte pri demokratiigo de aliaj socioj. Ni havas aliajn celojn, kiuj, tamen, ofte estas paralelaj al ideoj de demokratio. Tio signifas, ke ni bonvenigas demokratiajn procedojn en diversaj landoj, ĉar inter niaj valoroj estas egaleco kaj homaraneco, kiuj estas pli disvastiĝintaj en demokratiaj komunumoj kaj socioj. Tio

¹ Statuto de TEJO, 1.3.iv. <https://www.tejo.org/dokumentoj/statuto/>.

² Samloke. 1.3.v.

TEJO KAJ DEMOKRATIO

plifaciligas kontaktojn kaj donas pli da ebloj por antaŭenigi laboron kun lokaj junaj esperantistoj.

Ĉu TEJO kunlaboras kun politikaj institucioj de diversaj landoj?

Neŭtraleco de nia organizo ne signifas en si mem, ke ni ne interesiĝas pri politikaj aferoj, rilataj al la atingo de niaj celoj. Same kiel tio ne signifas ankaŭ nian rifuzon kunlabori kun politikaj organizoj kaj institucioj. Ni ja volas kunlabori por atingi niajn celojn kun politikaj institucioj kaj organizoj kaj la neŭtraleco de TEJO konkretiĝas en ĝia vasta malfermeco kunlabori kun aliaj organizoj, ankaŭ politikaj, havantaj celojn komunajn al ni.

Ĉu TEJO povas esti membro de iu alia organizo, devenanta el nedemokratia lando?

Ne estas limoj por membreco de TEJO en diversaj pli grandaj organizoj laŭ kriterio de ilia devenlando. Ĝi estas malfermita al ĉiuj nacioj. Tio estas nia esenca trajto. Tamen eblo de la membreco de TEJO en ajna organizo dependas de ties valoroj kaj la reciproka utileco de kunlaboro. Do, ne temas pri valoroj, kiujn disvastigas registaro de la koncerna lando. Se membroj kaj precipe gvidantoj de tiuj organizoj agadas laŭ principoj, respektataj kaj aprezataj de TEJO, tiaspeca kunlaboro certe povas ekesti.

Ĉu TEJO povas organizi eventon en nedemokratia lando eventuale kun subteno de publikaj instancoj?

Jes. TEJO estas preta organizi eventon en ajna lando por subteni la tutan enlandan esperantistaron, kiu povas havi diversajn politikajn opiniojn aŭ celojn. Ĉi tiu koncepto ne kontraŭas en si mem la bazajn principojn de TEJO rilate demokration.

Reprezentantoj de TEJO tamen devas eviti preni poziciojn kiuj kontraŭas demokration, homajn rajtojn aŭ aliajn valorojn de TEJO.

Ĉu TEJO povas kunlabori por evento okazigota en nedemokratia lando kun subteno de publikaj instancoj?

Jes. Kunlaboro en evento, kiun okazigas ajna registaro aŭ registara institucio, povas esti en agordo kun niaj celoj. Ĉi tial TEJO ne subtenas bojkotojn de eventoj aŭ landoj entute, ĉar ĝi ĉiam celas pliproksimigon de homoj de ĉiuj landoj kaj ne volas rezigni pri ajna socia tavolo, lando, aŭ politika emo pro ĉi tiu celo. Kiel TEJO esprimas en sia statuto, ĝi ĉiam volas "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo".³ En ajna evento, reprezentantoj de TEJO tamen devas eviti preni poziciojn kiuj kontraŭas demokration, homajn rajtojn aŭ aliajn valorojn de TEJO.

³ Statuto de TEJO, 1.3.iv. <https://www.tejo.org/dokumentoj/statuto/>.